



# *Esperanto en Danio*

23-a jarkolekto • n-ro 1 • februaro 2016



*Internacia*  
**TAGO** *de la*  
**GEPATRA**  
**LINGVO**

21-a de februaro 2016

*La internacia lingvo **Esperanto** respektas kaj subtenas lingvan kaj kulturajn diversecon tra la mondo.*

En oficiala konsulta partnereco kun UNESKO la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por edukado, scienco kaj kulturo.

## **Esperanto en Danio**

membroorgano de  
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

### **Adreso de la asocio/prezidanto:**

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 [dea@esperanto.dk](mailto:dea@esperanto.dk)

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

### **Kromaj estraranoj:**

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Peter Wraae

Filippo Botta

### **Redakcia adreso:**

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 [eed@esperanto.dk](mailto:eed@esperanto.dk)

### **Presado:**

DDFO

### **Adresŝanĝoj al:**

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas  
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.05.2016**

## **Enhavo**

**EK – al la jarkunveno de DEA. 3**  
**Omaĝo de Unesko al**  
**Zamenhof.....4**

**Programo de KEK.....5**

**Kial veni al Nitro?.....6**

**Kristana Esperantista Ligo**

**Internacia.....8**


**Internacia Infana Kongreseto! 9**  
**“Vintraj Tagoj” en Finnlando ..9**

**Poezio en Italio.....10**

**La unua koboldeta averto.....12**

**Plue pri Fukuŝima.....16**

## EK – al la jarkunveno de DEA



Dum pluraj jaroj nia jarkunveno okazis en Kopenhago pro praktikaj kialoj, sed ĉi-jare ni decidis okazigi ĝin meze de la lando, nome en Odense. La kunvenejo estos en Danhostelo Odense Kragbjerggaard, antikva grandbieno el la 1500-aj jaroj, kaj ege ujutna restadejo Ni esperas revidi multajn membrojn de ĉiuj partoj de la lando al tiu nia jara evento.

Nia gasto ĉi-jare estos la vicprezidanto de UEA, Stefan MacGill. ege aktiva estrarano, kun longa historio pri esperantista agado. En nia invitilo ni povis nur mallonge priskribi lian longan vivhistorion. Unu el lia lastatempaj agadoj estas la seminarioj pri Aktivula Maturigo – AMO. kiujn li iniciatis, okazigitaj ĝis nun kun multe da sukceso en preskaŭ ĉiuj kontinentoj. Ĉi-jare oni okazigos la 20-an seminarion. Normale la AMO-seminarioj daŭras plurajn tagojn, sed ni tamen spertos iomete la etoson de tiuj renkontiĝoj ĉar Stefan konsentis rakonti al ni pri la diversaj AMO-eventoj kaj gvidi mallongan AMO-analizon de nia movado.

Alia temo estos diskuto pri kiamaniere plej bone omaĝi la centjaran forpason de Ludoviko Zamenhof okazonta la 17-an de aprilo 2017, kaj kiel entute marki jubileojn, interalie por konigi pli bone la lingvon kaj ĝiajn kulturon kaj valorojn.


Do, ne forgesu **aliĝi al la jarkunveno antaŭ la 26-a de marto**. Vi ne bezonas sendi aliĝilon perpoŝte, vi povas sendi retmesaĝon al nia kasisto indikante la diversajn mendojn.

**Bonvenon!**

*Ileana Schrøder*

## Omaĝo de Unesko al Zamenhof

La 38-a Ĝenerala Konferenco de Unesko finiĝis la 18-an de novembro post du-semajna laboro en la sidejo de la monda organizaĵo en Parizo. Kiel ruĝa fadeno tra ĝiaj diskutoj iris la 70-jariĝo de Unesko kaj la realigo de la Celaro 2030 por Daŭripova Evoluigo, sed en sia ferma parolado la Ĝenerala Direktoro s-ino Irina Bokova ne povis ne tuŝi la lastatempajn terorismajn atakojn, interalie meze de la konferenca periodo en Parizo mem: *Tiu ĉi krima perfortaĵo trafas nin ĉiujn. Ĝi atakas ĉion, kio estas plej kara al ni: libereco, homaj rajtoj, la digno de ĉiu homo, nia sento de aparteno al la unusama homaro.*



Por esperantistoj la plej ĝojiga decido de la Ĝenerala Konferenco estas la envicigo de la 100-a datreveno de la morto de L.L. Zamenhof (14-a de aprilo 2017) inter 53 datrevenoj kun kiuj Unesko estos “asociita” en la periodo 2016-2017. Propono pri tio estis farita de Pollando, kun subteno de Germanio kaj Slovakio. Temas pri plia rekono de Unesko al Zamenhof post tiu okaze de la 100-a datreveno de lia naskiĝo, kiam li estis proklamita unu el la grandaj personecoj de la homaro.

Universala Esperanto-Asocio, kiu havas oficialan statuson ĉe Unesko ekde 1954, estis reprezentita de kvar observantoj: Renée Triolle, François Lo Jacomo, Oleksandra Kovyazina kaj Nathalie So Yun Kesler. Hazarde samtage, la 5-an de novembro, kiam estis akceptita la aŭspiciado de la Zamenhof-datreveno, UEA havis tempon ĉe la budo por ne-registaraj organizaĵoj, ĉe kiu la UEA-representantoj povis disdoni informilojn kaj respondi demandojn pri Esperanto kaj la agado de UEA.

[gaz kom uea 595]

## Programo de KEK

“Konversacia Esperanto-Klubo” kunvenas en la “Kulturdomo” Toms-gårdsvej 35, lunde je la 12.00 aŭ la 19.00 horo.

**8-an de februaro je la 19.00.** Ana Røssum gvidos.

Prelego pri la evoluo kaj ebleco iĝi mondĉivitano.

**15-an de februaro je la 19.00.** Babila vespero. Venu por babili pri ĉio kaj nenio.

**22-an de februaro je la 19.00.** Peter Wraae gvidos.

Estas kelkaj grupoj en la mondo kiuj uzas Esperanton. Mi priskribos kvar sanktajn/spiritajn grupojn. La Oomoto-anoj, la Ŭonbulistoj, la Bahaanoj, kaj la Tria Testamento de Martinus.

**29-an de februaro je la 19.00.** Plurpersonaj prelegetoj.

Diversaj personoj prezentas diversajn temojn dum 10 aŭ 20 minutoj.

Ĉiuj estas bonvenaj KUN aŭ sen temo. Komputilo kaj projekciilo estos disponeblaj.

**7-an de marto je la 12.00.** Betty Chatterjee gvidos.

Studgrupo. Ni daŭre legos la membiografion de Carl Nielsen. Ni legos la paĝojn 110-118.

**14-an de marto je la 19.00.** Ĉinio, “La Regno en la Mezo’ – moderna lando en moviĝo.

Tradicioj, kiuj originas de antaŭ jarmiloj, kaj ege moderna socio kun granda rapido en ĉiuj flankoj de la vivo unuiĝas en tiu plej popolriĉa lando de nia mondo. Vojaĝi en Ĉinio estas granda travivaĵo.

Lene kaj Jan Niemann rakontos pri trisemajna restado en plej diversaj anguloj de la lando – grandaj urboj, nekredeble bela naturo, renkontiĝoj kun ĝentilaj homoj....

**21-an de marto je la 19.00.**

Ĝeneralkunveno de KEK.

**Pro Pasko ne estos renkontiĝo la 28-an de marto.**

## **Kial veni al Nitro?**

**“Kial veni al Slovakio por la 101-a Universala Kongreso de Esperanto?” La prezidanto de LKK Peter “Petro” Baláž responde al ĉi tiu demando listigas kelkajn argumentojn kaj kialojn:**

La Universala Kongreso en Slovakio havos kelkajn specialaĵojn, pro kiuj indos ĝin partopreni:

- Historie unua UK en Slovakio.
- Ekologia kongreso (multaj partoprenantoj de Eŭropo povas atingi ĝin trajne, buse, aŭte, sen bezono de flugoj, ene de la urbo oni eĉ ne bezonos urban trafikon aŭ aŭtojn).
- Ekonomia kongreso (la tranoktado-prezroj ekas jam ĉe 7 EUR/nokto, ankaŭ la manĝokostoj estas modestaj, ekzemple, tagmanĝo en restoracio: 3,50 EUR, biero: 1 EUR).
- Pieddistanca kongreso (kongresejo, hoteloj, studenthejmoj, urbocentro, restoracioj, aĉetcentroj, ĉio ene de pieda distanco de 1 km).
- Videbla kongreso (Nitro estas relative malgranda urbo, danke al kio Esperanto kaj la kongreso estos tre bone videblaj al la loĝantoj de la urbo).
- Gastamo kaj gastronomio (indas veni sperti la slovakon gastamon kaj diversajn erojn de la slovakaj gastronomio: bongustegaj kaj kvalitaj vino kaj biero, multaj bonaj kaj favorprezaj manĝoj ktp.).
- Eblo malkovri Slovakion (landon meze de Eŭropo, kun tre riĉa historio, vidindaĵoj, naturbelajoj).
- Eblo ekkoni slavan kulturon (Nitro estis lulilo de la unua slava skribo: glagolico. Dum UK eĉ eblos lerni skribi per ĝi! Same okazos pluraj prelegoj pri slavaj temoj.).
- Nova jarcento de kongresoj (impulso por modernigo, novigo de la plej granda Esperanto-festivalo).
- Riĉega junulara programo (Nepre indos ĝin partopreni, la programeroj

estos tre variaj kaj allogaj!).

- Riĉa kultura programo (koncertoj, teatraĵoj, filmoj, ekspozicioj, diskotekoj...).
- Riĉa faka programo (akompanaj aranĝoj, scienca kafejo, kleriga lundo, kreivaj metiejoj ktp.).



Ĉi-jara kongresa celo estas agi ekstermovade kaj malfermi nian movadon al la mondo kaj serĉi aliancinojn por kunlaboro kaj nia plua pli efika agado. La 101-a UK volas por tiu ĉi celo utiligi la fakton, ke la kongreso okazos en la tempo, kiam Slovakio prezidos la Konsilion de EU (julio–decembro 2016). Dum la 101-a UK inter la 23-a kaj 30-a de julio 2016 okazos kvar malfermitaj fakaj aranĝoj:

1. Lingvo-politika konferenco de Viŝegradaj landoj V4+ “Perspektivoj de lingva komunikado en EU”.
2. Internacia entreprenista kaj komerca forumo “Investi en koro de Eŭropo – investi en Slovakio”.
3. “Inter-religia renkontiĝo” de reprezentantoj de diversaj religioj.
4. La 20a Internacia Medicina Esperanta Kongreso.

Certe indas mencii ankaŭ pli vastajn kaj ĝeneralajn kialojn veni al UK 2016:

- Renkonti siajn (malnovajn) amikojn
- Ekkoni novajn amikojn de la tuta mondo
- Subteni la plej grandan Esperanto-aranĝon kaj Esperanto-organizon
- Sperti unikan atmosferon de UK, la spiriton de amikeco, lingva egaleco kaj homa interkompreniĝo kaj frateco

Se vi ne trovis en la listo “la vian” kialon, volonte informu nin pri tio: [lk@esperanto.sk](mailto:lk@esperanto.sk).

Kaj se vi jam venos al UK pro iu ajn kialo, dankon anticipe kaj: ĝis revido somere en Nitro!

Pliaj detaloj pri la 101-a UK troviĝas ĉi tie:

<http://www.nitra2016.sk/>

<https://www.facebook.com/uk2016>

<http://www.uea.org/kongresoj>

Respondis **Peter Baláž**, LKK-prezidanto

*Ĉi tiu artikolo aperis en la februara kajero de La Ondo de Esperanto 2016, rete: <http://sezonoj.ru/2016/01/nitro>.*

## **Kristana Esperantista Ligo Internacia**

invitas Vin partopreni la 66-an kongreson de KELI, kiu okazos en **Bratislava**, ĉefurbo de Slovakio dum la tagoj 16.–23. de julio 2016. Se Vi volas ĝui amikan kristanan medion en la nova kaj sufiĉe komforta teologia fakultato, tuj aliĝu!! Ankaŭ tiuj, kiuj partoprenos UK-on en Nitro, povas plilongigi sian restadon en Slovakio kaj ekkoni belan urbon Bratislava. Nitro estas bone atingebla!

La programo estos tre varia. Du diservoj, ĉiutagaj preĝoj, kantado, diversaj prelegoj, koncertoj, 2 duontagaj kaj unu tuttaga ekskursoj.

Pliajn informojn kaj aliĝilojn sendas Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ - 290 01 Poděbrady, e-mail: [polnickypavel@seznam.cz](mailto:polnickypavel@seznam.cz)



## Internacia Infana Kongreseto!

IIK okazos norde de Nitro, nur 4 km de UK-ejo, en veterinara lernejo kun granda tereno. Ni manĝos en granda salono kaj dormos en 2-3-litaj ĉambroj. Gepatroj de junaj infanoj povas dormi kun siaj infanoj en la sama ĉambro kaj matene veturi per buso al la UK-ejo.

Ni disponas pri pluraj lokoj por sporto kaj ludoj, ni povas prizorgi diversajn bestojn. Ni serĉas helpantojn, ekzemple sportemulon (sportinstruiston), vartist/in/on kaj ĉiun kiu ŝatas infanojn.



Retpaĝo: <http://bertosch.free.fr/iik2016/>

Retadreso: [infana.kongreseto@gmail.com](mailto:infana.kongreseto@gmail.com)

## “Vintraj Tagoj” en Finnlando

En decembro 2015 estis pasintaj 150 jaroj post la naskiĝo de la finna komponisto Jean Sibelius (1865–1957). La jubilean jaron oni celebris en pluraj regionoj Finnlandaj kaj eksterlandaj, ne laste en Hämeenlinna (svede Tavastehus), la naskiĝurbo de Sibelius. Multaj asocioj, la urbo kaj la organizo “Sibelius Celebrations” primemoris la komponiston per pli ol 80 eventoj, ne ĉiuj nur koncertoj.

Ĝuste en Hämeenlinna (unu horon trajne for de Helsinko) okazos la **Vintraj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando**, inter la 12-a kaj 13-a de marto 2016. Sabate estas en la programo publika prelego pri Jean Sibelius, jarkunveno kaj vesperumo en la kunvenejo. Dimanĉe ni konatiĝos kun la urbo gvidate de lokaj esperantistoj.

Informoj: *Tuomo Grundström*, [tuomo.grundstrom@gmail.com](mailto:tuomo.grundstrom@gmail.com),  
tel. +358 440 199766

Kontakto loke en Hämeenlinna: *Marjatta Niemi*,  
[marjatta.laimani@gmail.com](mailto:marjatta.laimani@gmail.com), tel. 050 5678 690.

**Bonvenon en Hämeenlinna!**

Pri la Vintraj tagoj kaj aliaj eventoj de EAF, vidu:  
<http://www.esperanto.fi/Eventoj>.

## Poezio en Italio

*Ĉi tiu poemo de la malta esperantisto Carmel Mellia gajnis en 2015 la unuan premion en la Konkursoj de Samideano, literatura konkurso kun la patroneco de la Komunumo Sankta Anĝelo de Brolo (Mesino, Sicilio, Italio) kaj de la Itala Esperanto-Federacio.*

### Balado pri poeto

Poet' eniris mallarĝetan straton  
je kies ekstremaĵo lin atendis  
la Moŝtulino sen rekoni daton.

Tamen renkonti lin Ŝi ja pretendis  
je ĝusta loko, kiun li ne konis,  
kie l' verdikt' de lia vivo pendis.

Li aŭdis la trumpeton, kiu sonis  
kaj ŝajnis ja la tempo agonias,  
kiam la Ĉio apoge-plafonis.

Retrorigardis li; teatro lia  
ludiĝis per roluloj ĉiuklasaj:  
floto jen brila jen misproporcias.

Nu, ĉu miraĝoj iluzi-fatrasaj  
estis la ĉiutagaj melodioj?  
Ĉu ŝatoj nur haladze embarasaj

Plenumis lin la ĉiutagaj dioj,  
el li ĉizante radiantan lumon;  
tiele multobliĝis liaj "mioj".

Kaliopa lin kisis, dum en fumon  
disiĝis liaj pensoj matadoraj.  
Entrudis ŝi ĉe l' manon novan plumon.

Eliĝis el la mano sonoj foraj  
kiel tiuj de harp' aŭ violono  
ŝvebantaj ĝis l' altaĵ' de spacoj gloraj.

Sidiĝis la juĝist' sur alta trono  
farita el beletra ĉielarko,  
kie nek regis ambici' nek mono,  
meze de l' maro en nur unu barko  
kreita per vortara fenomeno,  
lumigita de saĝa oligarko.

Ĉe la matenkrepusko la Ordeno  
Parnasa lin hurae alegrigis  
en tute nova fabelec-Edeno,

kie per laŭroj oni lin kronigis.  
Tuj ŝia Morta Moŝto lin vualis  
kaj poreterne lin al si alligis.

Post tiu gloro, ĉio trivialis.

*La italaj esperantistoj entute estas tre aktivaj en la poezia fronto. Laste aperis “Kiam ekfloras la migdalarbo...”, kolekto de 26 poemoj, verkitaj de 7 aŭtoroj en la triesta dialekto. Tradukis ilin triesta teamo konsistanta el Edvige Ackermann, Elda Doerfler kaj Anita Peric Altherr. La poemoj legeblas kaj en dialekto kaj en Esperanto en unu sama volumo.*


*Eld. Triesta Esperanto-Asocio. Okt. 2015. 70 p. Bind.*

*Kosto: € 12,00 plus sendokostoj.*

Kontakt-adresoj: [esperantotrieste@yahoo.it](mailto:esperantotrieste@yahoo.it) [testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com)



*Carmel Mellia  
ricevante la premion*



## La unua koboldeta averto

*La jenan koboldan mesaĝon transsendis al ni Betty Chatterjee, voĉlegante ĝin ĉe la Zamenhofa festo de Konversacia Esperanto-Klubo en Kopenhago, la 13-an de decembro 2015.*

Bonan tagon karaj amikoj! Mi nur skribas al vi, bonvolu ne tuj ofendiĝi, ĉar vi ĉiuj estas maturegaj plenkreskuloj, kaj tial, ĉar mi supozas, ke vi ankoraŭ posedas taŭgajn memorkapablojn, vi komprenos la koboldetan vidpunkton.



Al la afero. Vi certe memoras la tempon, kiam mia koboldeta popolo kaj via popolo harmonie kunvivadis respektante unu la alian. Ni komforte loĝis en subtegmentejoj, kaj la loĝantoj en la aliaj etaĝoj ne nur toleris nin, sed ili decembre ĉiam donis al ni tiom da rizkaĉo, ke ni povis festi ĝis Pasko. Pro tio ni prizorgis vian bonfarton. Ni eĉ donis al bonkonduktaj infanoj koboldetajn ĉapelojn kaj kristnaskajn kuketojn. Ĉu vi rememoras la bonan kristnaskan etoson?

Nu, mi nun skribas al vi pro granda malfeliĉo triobla, kiun mi kaj miaj gefratoj travivas: la malapero de subtegmentoj, la manko de rizkaĉo kaj la malkreskanta kredo je la ekzisto de koboldetoj.

Unue la malapero de subtegmentoj. Iam ĉiuj praktikuloj volis loĝi en domo kun subtegmentoj. Kial? Ĉar ĉiuj bezonis lokojn por heredaĵoj senutilaj, kristnaskaj donacoj senutilaj kaj aliaĵoj, kiuj verŝajne neniam estos utilaj. Tial saĝaj domkonstruistoj ĉiam konstruis domojn kun subtegmentoj. Kiaj

paradizoj koboldetaĵoj! Ni neniam tediĝis! Imagu! La plenkreskuloj legis malnovajn gazetojn. La infanoj pro amuzo vestis sin per avinjaj ĉapeloj kaj korsetoj. Mi mem amegis puzlojn, kvankam ĉiam mankis al ili iaj puzleroj.

Pro la fakto, ke la aliaj domloĝantoj preferis forgesi la subtegmentejan malordon, malofte venis enmiksigemuloj. Tamen, se iu hazarde venis, tiam ni silente ekkaŝis nin en antikvajn vestoŝrankojn, kies solaj loĝantoj estis lignovermoj, kaj pro la konstanta maĉado tiuj neniam plendis pri niaj vizitoj.

Tamen, ho ve iom post iom malaperas la stoko da subtegmentoj, kie ni povas enloĝiĝi. Domkonstruistoj nuntempe konstruas subtegmentajn apartamentojn, aŭ posedantoj de malnovaj subtegmentoj forĵetas ĉiajn senutilajn trezoraĵojn, por ke ili rekonstruu la ejojn kiel tegmentajn apartamentojn. Ili neniam pensas pri niaj loĝraĵoj. Tiaj fiaj akaparistoj kaj akaparantoj nur pensas pri mono. Pro tio pli kaj pli da koboldaj familioj senhejmiĝas.

Nun al la dua afero, kiu estas la malabundo da rizkaĉo. Mi memoras, ke estis familio en nia domo, kiu tiom ŝatis rizkaĉon, ke ĉiutage ekde la 1-a ĝis la 24-a Decembro ili manĝis ĝin. Kiam la patrino regalis la familion per tiu bongustaĵo, ŝi ankaŭ disverŝis iom da rizkaĉo por mia familio. La tasko suprenporti la bovlon subtegmenten apartenis al la plej juna familiano, kies nomo estis Grete – ho kiajn safirokolorajn okulojn, kian safrankoloran hararon kaj kian melodian voĉon ŝi havis!

Nu, mi revenu al la afero, Grete ĉiutage kunportis plenan bovlon da rizkaĉo kaj reportis la malplenan bovlon de la antaŭa tago. La bovloj estis ĉiam malplenaj, ĉar la koboldetoj ŝategis la rizkaĉon de ŝia panjo. Mi aparte informas vin pri tiu detalo, ĉar antaŭ kelkaj tagoj iu kolego informis min, ke li aŭdis teruran klaĉon ie en la urbo: iu skeptikulo asertas, ke tiam ratoj, ne koboldetoj manĝis la kaĉon. Kia mensogulo! Tamen tio signifas, ke se stultuloj senkritike enkapigas la sensencaĵojn, eĉ en konstruaĵoj kun tradiciaj subtegmentoj, oni rezignas liveri al ni la ĉiutagan rizkaĉon. Kaj

imagu, tie, kie oni ankoraŭ memoras niajn bezonojn, oni donas al ni nur ĉipan kaĉaĉon de ia superbazaro.

Domestroj de la mondo! Hontu! Ĉu vi ne plu scipovas kuiri? Ĉu gepatroj ne plu instruas al siaj infanoj la noblan arton kuiri rizkaĉon? Ĉu instruistoj kaj pedagogoj ne konscias pri la devo instrui al ĉiuj civitanoj la arton kuiri sanan manĝaĉon? Kio estas la rezulto? Dum akaparemaj posedantoj de superbazaroj ĉiutage manĝas kaviaron, aliaj manĝas aĉaĉojn – ne, mi eĉ ne nomas tiaĉojn manĝaĉoj! Nu, mi ne deflankiĝu, tio ne estas mia kapdoloro. La ĉefa problemo estas la malsatego de mia popolo. Ni malsategas! Ĉu vi komprenas?

Nu, al la tria afero - la fundamenta afero. Oni ne plu kredas je ni, kaj tion mi ne komprenas. Ĉu vi komprenas, kial viaj samtempuloj ne plu kredas ĝuste je ni? Imagu, eĉ la dentofeino estas pli konata kaj respektata ol ni! Tamen infanoj kaj ankaŭ plenkreskuloj kredas je aliaj tielnomitaj fabelaj estaĉoj. Ĉie ĉiuj, ĉion scias pri Ĵedajoj, Stelmilitaj herooj, Harry Potter kaj Hobitoj ktp. Nu, mi konfesas, ke ankaŭ mi estas adoranto de Harry Potter kaj la hobitajn sintenojn pri manĝaĉo mi tute subtenas. Tio ja pruvas, ĉu ne, ke homoj kaj koboldetoj ankoraŭ sopiras je fabeloj kaj fantazio.

Vi eraras, se vi opinias, ke mi envas la mondfamulojn George Lucas, J.K.Rowling kaj Profesoron Tolkien. Eĉ se iliaj herooj estas artefaritaj, mi bonvenigas ilin, ĉar ju pli da fantazio en nia mondo des pli ni povas transvivi la ĉieajn malfeliĉojn. Tamen agacas min la ruza ekspluato komerca de iliaj epopeoj, dum neniuj emas promocii nian fabelan, fantazian sed tute aŭtentikan epopeon. Pro tia neglekto ni pli kaj pli malriĉiĝas!

Gekaruloj, ni senhejmiĝas, ni malsategas, ni tiom malriĉiĝas, ke okaze de Kristnasko, ekzemple mi ne povas aĉeti eĉ la plej etajn figuretojn de Harry Potter por miaj genepoj! Nu, mi ne volas timigi vin, ĉar mi certas, ke la kulpo ne estas via. Tamen mi avertas vin. Pro la malespero tre baldaŭ okazos la unua koboldeta ribelo.

Kia estos tia ribelo? Nu, la sukceso de ia ajn kampanjo dependas de la

bontrovo de la kampanjantoj, ĉu ne? Tial, eĉ se mi scius pri la detaloj, mi ne informus vin.

Tamen la historio estas tre utila fako, kiun tiel kiel la kuiradon oni nuntempe neglektas. Mi konsilas al vi, ke vi informiĝu pri la pli ol miljara koboldeta historio. Miaj prauloj konis viajn vikingajn praŭlojn. Kiam viaj prauloj estis bienistoj, miaj prauloj estis iliaj helpantoj. Tamen se oni forgesus doni al ili la bovlon da kaĉo iam ajn, ho ve, okazis malagrablaĵoj.

Imagu! Iam estis impertinentulino, kiu manĝis la kaĉon koboldetan, kaj deposte ŝi fie uzis la bovlon kiel pisujon. Nu, la bona koboldeto ĉiun nokton ĝis Pasko forĵetadis ŝin el la lito. Tio estas nur unu el la centmiloj da malagrablaĵoj, kiuj okazis al neprudentuloj kaj forgesemuloj. Eĉ post kiam mia popolo plejparte urban migris, tiam la sama leĝo daŭre validis, ĝi ankoraŭ validas kaj eterne validos. Konscienculoj neniam suferis, male ili ĉiam prosperis. Do, gekaruloj jen via devo! Informu viajn gefilojn, informu viajn genepojn, informu ĉiujn pri la sekvoj.

Karaj geamikoj, ne timu, ĉar la koboldeta popolo estas justa, afabla kaj zorgema. Ni traktis, traktas kaj traktos ĉiujn laŭmerite. Vi certe havos bonan Kristnaskon. Ne timu, ke la anasaĵo estos malfacile maĉebla, ke la vino estos acida, ke mankos al la rizkremo sufiĉe da migdaloj, aŭ ke vi perdos la migdalan donacon, aŭ ke ankaŭ la vazlavilo kaj la fornelo kaj la televidilo kaj la komputilo difektiĝos la 24-an de Decembro.

Finfine esperante, ke vi komprenu la koboldetan vidpunkton.

Afable, amike, sed averte.

*Koboldeto.*



## Plue pri Fukuŝima

La 2-an kaj la 3-an de decembro 2015 okazis Zamenhofa Festo en la Esperanto-Societo de Fukuŝima. Mi estas kvazaŭa membro de tiu societo, loĝanta en la najbara gubernio Gunma. La 2-an ni tranoktis en la varmfontejo Dake, kaj la 3-an mi iom turismis en la urbo Nihonmacu, kaj posttagmeze mi vizitis la najbaran urbon Motomija,.

Dank' al mia helpagado por la suferantoj de la Katastrofo, mi renkontiĝis kun homoj, kiujn mi alie neniam renkontus. Pere de instruistino en Fukuŝima mi renkontis s-inon Taĉibana, kiu rifuĝis de la urbo Namie, najbara urbo de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, kaj nun loĝas en la urbo Motomija.

Antaŭ du jaroj ŝi eldonis broŝuron pri sia vivo. Mi hazarde akiris ĝin kaj poste aĉetis de ŝi 20 ekzemplerojn por vendi al miaj konatoj en mia urbo. En ĝi ŝi skribis sian karieron jene:

En 1939 mi naskiĝis en Manĉurio en nordorienta Ĉinio, tiam kolonita de Japanio. En 1946 mi revenis al Japanio.

Poste dum 37 jaroj mi laboris en la urbo Namie kiel instruistino de la angla lingvo. Mi agadis por paco kaj demokratio kiel sindikatano.

En 2000 mi eksiĝis de la laboro.

La 11an de marto 2011 okazis la Katastrofo. Mi suferis pro la nuklea akcidento kaj translokiĝis al la urbo Motomija.

Post la nuklea akcidento ŝi jene spertis rifuĝantan vivon:

<b>Datoj</b>	<b>Rifuĝejoj</b>
La 11an de marto 2011	Ripozejo de la urbo Namie
La 12an~14an de marto	Kunvenejo de la distrikto Cuŝima de Namie
La 15an de marto	Gimnastikejo de la urbo Nihonmacu
La 16an~la 18an de marto	Hejmo de ŝia amiko
La 19an~la 5an de aprilo	Hejmo de ŝia fratino en la gubernio Kanagaŭa



La 6an~la 30an de aprilo	Hejmo de ŝia frato en la gubernio Kanagaŭa
La 1an de majo~la 6an de majo	Hotelo en la urbo Koorijama
La 7an de majo~la 6an de oktobro	Vilao de ŝia amikino en Motomija
La 7an de oktobro~la 25an de junio 2012	Provizora domo en la urbo Motomija
La 26an de junio ~ ĝis nun	Alia pli granda provizora domo en la sama distrikto

Tre severa rifuĝanta vivo! Ĉiuj rifuĝintoj diras, ke ili translokiĝis minimume 5 aŭ 6 fojojn de unu loko al la alia. S-ino Taĉibana nomas sian nomadan vivon kiel la duafojan rifuĝantan vivon truditan de la registaro. La unuan fojon ŝi spertis tian vivon en Manĉurio post la fino de la dua mondmilito, kiam la enmigrintaj japanoj estis postlasitaj inter atakoj de sovetuniaj soldatoj.

Post la nuklea akcidento la urbo Namie fariĝis neloĝebla, do la urba administracio translokiĝis al la urbo Nihonmacu kaj ĉiuj loĝantoj dise loĝas en 31 provizoraj domaroj en 11 urboj en la gubernio Fukuŝima. Kompreneble krome troviĝas urbanoj, kiuj rifuĝis en aliaj gubernioj, kaj eĉ eksterlande.

La provizora domaro en la distrikto Takagi en la urbo Motomija estas unu el tiuj 31. En tiu ĉi domaro troviĝas 3 specoj de domoj: 1K (unu ĉambro kaj kuirejo, banejo kaj necesejo por sola loĝanto), 2K (du ĉambroj ktp por 2 personoj) kaj 3K (3 ĉambroj ktp por pli ol 2 homoj). Komence tie loĝis 62 familioj, sed nun loĝas 35. S-ino Taĉibana nun loĝas en 3K-domo, translokiĝinte el 2K-domo post kiam ekestis neuzataj 3K-domoj.

### **Vizito al ŝia provizora domo**

La 3-an de decembro ŝi renkontis min ĉe la stacidomo de Motomija je la 1-a horo. Ŝia aŭtomobilo kondukis min al la montara distrikto, kie estas sportaj instalaĵoj de la urbo. Oni konstruis la domaron en ĝia parkejo. Tie vicis domaroj. Ŝi haltigis la aŭtomobilon ĉe la kunvenejo, kaj apude estis ŝia domo. Mi volis vidi la internon de ŝia domo, sed ŝi ne invitis min.

Apud la kunvenejo estis maŝinoj por forigi neĝon. Mi estis surprizita pro

ŝia rakonto pri neĝado ĉi tie: “En januaro multe neĝis kaj la tavolo fariĝis unu metron profunda”. En la urbo Namie preskaŭ neniam neĝas, do la rifuĝintoj estis certe konsternitaj pro tiom da neĝo.

Anticipe mi anoncis mian viziton kaj okazigon de mia koncerto de mondaj muzikiloj, do kiam mi alvenis al la kunvenejo, jam kolektiĝis tri viroj kaj kvar virinoj. Mi miris, kial mezaĝaj viroj venas. Ĉu ili estas senlaboraj aŭ laboris nokte? Dum 90 minutoj mi montris miajn talentojn al ili kaj amuzadis ilin, sed iliaj mienoj neniam fariĝis brilaj eble pro malkontento kaj maltrankvilo pri sia vivkondiĉo.

### **Kolerego de ŝia eksa lernanto**

Je 3h20 mi decidis foriri per la aŭtomobilo de eksa lernanto de s-ino Taĉibana. Dume mi havis iom da libera tempo, do mi promenis en la tereno, kaj demandis lin, kiom estas kvanto de radioaktiveco tie, kaj li montris ciferojn montritajn sur la bultenejo apud la kunvenejo. La ciferoj estis ĉirkaŭ 0,18 mikrosivertoj, do malpli grandaj ol la permesita maksimuma normo de 0,23. Li diris: “La terenon de la domaro oni purigis, do la ciferoj ne estas grandaj, sed ..., venu al mia domo.” Li kondukis min al sia domo. Malantaŭ ĝi estis malgranda herbejo ĉirkaŭita per barilo. “Tiun ĉi lokon oni ne purigis, do la cifero estas granda.” Mi etendis mian brakon kun dozmetro super la herbejo, kaj la cifero tuj grandiĝis al 0,24.

Li plu kondukis min al alia loko ekster la barilo, kie la loĝantoj povas libere promeni. Mi mezuris radioaktivecon tie, kaj la cifero tuj atingis 0,80. Li kolere diris al mi: “Ni rifuĝis de mia urbo Namie al tiu ĉi loko, ĉar tie estas radioaktive poluite. Kial ni devas denove loĝi en tiu ĉi poluita loko? En la urbo Namie nun troviĝas distriktoj malpli poluitaj ol ĉi tie.” Li jam petis de la urbo Motomija, ke oni purigu la ĉirkaŭaĵojn de la provizora domaro, sed la urbo respondis, ke la tereno apartenas al la ŝtato, do la urbo ne povas fari ion pri ĝi. Li plu petis de la urbo, ke ĝi transsendu lian peton al la ŝtato, sed respondo ne venis.

En la aŭtomobilo al la stacidomo lia kolero ne mildiĝis. “Antaŭe mi havis

etan aŭto-riparejon, sed ĉi tie mi ne povas labori. Mia vivo dependas de la kompensa mono de TEPCO, sed post 2 jaroj ĝi ne plu pagos al mi. Mi devos translokiĝi de la provizora domo ien, ĉar la loĝrajto eksdatiĝos post 2-3 jaroj. La registaro kaj TEPCO certe atendas nian morton. Se ni mortos, ili ne bezonos pagi al ni kompensan monon. Ili ne zorgos pri niaj plendoj kaj kritikoj. Lokaj homoj ne estas amikaj al ni, miskomprenante, ke ni ricevas multe da kompensa mono. Mi volus diri al ili: ‘Mi volonte donos al ili tiun sumon kaj la provizoran domon, se ili donos al mi ilian domon anstataŭe.’”

Tiu ĉi provizora domaro izolite situas en la montaro, kvazaŭ ĝi estus forĵetita. La loĝantoj ne povas ĝui homajn rajtojn garantiitajn de la japana konstitucio. S-ino Taĉibana diras: “La registaro kaj TEPCO tre lerte uzas monon por estigi diskriminacion kaj malamikecon inter ni, enmigrintoj, kaj la loĝantoj. Se ambaŭ interbatalas, ili povas esti trankvilaj, ĉar neniu kritikis ilin. Troviĝas ruzaj homoj kaj en la registaro kaj en TEPCO.” Estas kompreneble, ke ŝi kaj ŝia eksa lernanto estas koleraj kontraŭ ili. S-ino Taĉibana batalas kontraŭ ili, sed tiu eksa lernanto estas pesimisma pri ŝia batalo. Li diras: “Ŝi kontraŭbatalas en la juĝejo, sed tio tute ne estas bato al ili. En kelkaj jaroj ŝia batalo finiĝos nebule sen rezulto.”

Antaŭe s-ino Taĉibana diris al mi: “Mi ne translokiĝos de la provizora domo kaj ni vidos, kio okazos fine.” Ŝajnis al mi, ke ŝi ankoraŭ ne perdis sian batalemon, sed ŝi jam estas 76-jara. La batalo en la juĝejo daŭros longe. Vere, nuklea akcidento estas kruela. Ĉiuj loĝantoj laŭ la marbordo de Fukuŝima suferas pro la akcidento. Malgraŭ tio la registaro aprobas refunkciigon de nukleaj reaktoroj en Japanio, kio povos naski novajn suferantojn. Vere mankas al la ĉefministro Abe kaj lia partio homeco kaj amo al la popoloj. Kolerado de s-ino Taĉibana estas “terpoto kontraŭ ferpoto”, nome malfortulaj plendoj al fortuloj, sed ni kiel sinceraj homoj, kiuj havas respondecon pri la sekvantaj generacioj, ne povas rezigni batali. Ni devas tenadi alte nian sloganon “Ni ne permesas la politikon de Abe”.

*HORI Jasuo*



*Distras nin Mikael, lia patro, Jonas kaj Victoria.  
Direktas la muzikistaron Elvira, la filino de Victoria.*

El la Zamenhofa festo de KEK  
la 13-an de decembro 2015

*Parolas la prezidanto de KEK, Peter Wraae (plej dekstre).  
Fone la libroservo prizorgata de Arne Casper.*

